

12324 Kontenero kun radetoj por kombinita fervoja-ŝosea trafiko.

dana	afrulningscontainer
franca	caisse amovible
germana	Abrollcontainer
rumana	container rulant

Jen terminproponoj:

1) kontenero radhava


2) kontenero kun radoj

La difino estas tradukita el la portugala teksto. La angla kaj germana difinoj vere apartenas al 02023 (kontenero kun manipol-ekipaĵo). Vidu en TeKu 121 sur paĝo 7.

Fine mi dankas al la amikoj kiuj sendis sian kontribuon en la pasintaj monatoj. Mi esperas pri daŭriga fruktodona kunlaboro por bonkvalite evoluigi nian karan faklingvon.

Travivu gaje la baldaŭajn festotagojn en familiaj kaj geamikaj rondoj lau viaj kulturo kaj tradicio eŭropaj aŭ aziaj.

Pacan, sanan, sukcesan kaj feliĉan novan jaron elkore deziras
Heinz Hoffmann.



Terminara Kuriero

TeKu 126

Decembro 2005

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

kiel ĉiam tro rapide finiĝas unu jaro. Jen aktualaj informoj pri terminara laboro. Atentu la **novan retadreson** de nia gvidanto *Jan Uldal Niemann*:

<niemann@kabelmail.dk>

Bedaŭrinde

- nia kunlaboranto *Bruno Henry* skribis ke tro da okupoj kaj zorgoj malhelpas siajn laborojn por IFEF, kaj
- tute ne sukcesis kontakti kun *Jean-Paul Villermé*.

Sekve sola terminara kunlaboranto en Francio estas *Marc Noulin*.

Pri la kontribuo de *Zlatko Hinšt*

Sub la titolo "Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminojn" en TeKu 125 sur paĝoj 4-6, d-ro *Zlatko Hinšt* diskutigis tri neologismojn en la fako ekonomiko. Esperanto ja principe estas malferma por neologismoj; tamen oni esploru, ĉu ili vere avantaĝas en la konkreta afero. Pri la artikolo alvenis leteroj de du fakuloj de ekonomiko, kiuj esprimas tute malegalajn opiniojn:

- Nia kunlaboranto *Zdeněk Polák*, inĝeniero-ekonomikisto, laste universitata pedagogo, subtenas la tri neologismajn proponojn.
- D-ro *Werner Bormann*, prezidinto de Akademio de Esperanto, skribis:

«... d-ro *Zlatko Hinšt* ... proponas „domando” kaj „ofro” kaj „revenuo”. Tion farante ti preteratentas, ke Esperanto vivas jam dum jarcento kaj ke ĝi havas siajn terminojn en uzado. Mi estas tia esperantisto, kiu aplikas Esperanton en la fako ekonomio, en AIS-prelegoj (kie mi estas profesoro pri ekonomiko), en IKU, en libroj, en diskutoj ktp.

Se la menciitaj neologismoj enkondukiĝus, la ekzistantaj libroj ktp perdus sian valoron. Ni devus diferencigi inter la Esperanto antaŭ 2005 kaj tiu de poste. Kiel ni klarigu tion ekzemple al Eŭropaj institucioj, kiam ni pledas por nia afero? Esperanto kiel iu nestabila projekto, en kiu ĉiu ajn povas fari siajn ŝanĝojn? Adiaŭ bela revo pri neŭtrala mondlingvo!»

Kolego *Hinšt* rekomendas viziti la retejon <www.ikef.info>, kaj tie legi liajn artikolojn en la periodaĵo „La Merkato” 10/2004 kaj 1/2005.



Rezulto el la tri taskoj en TeKu 125

1. Koncerne la nocion **09217** alvenis tria terminpropono de *Jan Uldal Niemann* kaj *E Henning Olsen*: **tranĉeado kovrita (tunnelkonstruo laŭ Berlina metodo)**

Kvankam laŭ PIV la vorto „tranĉeo” estas sole substantivo esprimanta kavajon, la kolegoj argumentas per komparo kun la PIV-verbo „tuneli” esprimanta bori tunelon. Do ilia propono esprimas fosadon de tranĉeo sub protekto de kovrilo. Vidu la difinon sur paĝo 5.

Mi daŭrigas la peton pri terminelekto kiel taskon por 2006.

2. Por la nocio **10254** kolegoj *Jan Uldal Niemann* kaj *Marc Noulín* konsentis la proponitan terminon **ranĝostacio kolekta-distribua**.

Sekve mi deklaras tiun solvon decidita.

3. Per korespondado kun kolego *Marc Noulín* pri la ne tute klare vortigita franca difino **01141-2** estiĝis jena Esperanto-difinvortigo:

Regejo, neceskaze kun aparataro por itinera interriglado, inkludita en sistemo de trajntrafika ordonado kaj signalkontrolo, en kiu regejestro plenumas sian servon.

Laŭ mia scio, ĉe moderna regtekniko (relajsa, elektronika) trajntrafikestro preskaŭ ĉiukaze mem regas la trajntrafikon sen subordigitaj regejoj. Nur ĉe malnova regtekniko (mekanika, elektromekanika) pleje ekzistas kaj ĉefaj regejoj (laborloko de trajntrafikestro) kaj de tiuj suborde dependaj regejoj – ankaŭ por trajntrafiko (laborloko de regejestro). Guste pri tio lasta temas la nocio 01141-2. Sole en regejo por nura manovrado – pri kio ne temas – la regejestro kompreneble laboras sendepende de trajntrafikestro.

Mi daŭrigas la peton pri terminelekto kiel taskon por 2006.

Niaj taskoj ĝis la kongreso en Ŝanhajo

Bonvolu pripensi la sekvajn Esperanto-terminproponojn, kaj elekti la viaopinie plej trafajn, aŭ mem proponi novan solvon.

01141-2	Difinon vidu supre.
franca	cabine de signalisation
germana	Wärterstellwerk (ne en <i>RailLexic</i>)
Esperanto	(malĝuste) signalilregejo


Jen terminproponoj:

- 1) regejo dependa trajntrafika
- 2) regejo suborda trajntrafika

02386 Eksplicita deklaro sur transportletero fare de ekspedanto, kiu kontraŭ antaŭa pago laŭ la produto de deklarita sumo kaj destinlanda koeficiento, ebligas al la ekspedinto plivastigi la ĝeneralajn, en la regularo *CIM* indikitajn limojn de damaĝkompenso.

La difino estas prenita de 04688 (intereso pri senprokrasta livero), ĉar tie netrafa.

ĉeĥa	deklarace zájmu o dodání
dana	angivelse om interesse i levering
germana	Lieferwertangabe



09217 Konstrumetodo por subteraj trafikvojoj, ĉe kiu unue estas instalataj la flankaj muroj, betonata la kovrilo, kaj rekonstruataj la superaj veturvojoj, kaj poste sekvas terfosado kaj konstruado de la subtera trafikvojo sub protekto de la kovrilo.

Ĉar la metodo estis unue aplikata en Berlino, pluraj naciaj terminoj rilatas al tiu urbo:

ĉeĥa	ražení tunelu berlínskou metodou
germana	Tunnel nach Berliner Bauweise
pola	tunel budowany metodą berlińską
serba	izgradnja tunela otvorenim iskopom („berlinska metoda”)

Pri aliaj nacilingvaj terminoj vidu en TeKu 124 sur paĝo 4.

Jen terminproponoj:

- 1) vojkonstruo subtera laŭ Berlina metodo
- 2) konstrumetodo Berlina (subtera trafikvojo)
- 3) tranĉeado kovrita (tunnelkonstruo laŭ Berlina metodo)

11278 Interspaco ĝis danĝerpunkto, en kiu por sekura trajnĝvidado necesas haltigi trajnon, kalkulata el certe ebla bremsadmalakcelo sub ĉiuj ekspluatkondiĉoj.

ĉeĥa	absolutní zbrzdňá vzdálenost
dana	absolut bremssevej
germana	absoluter Bremswegabstand
franca	distance de freinage absolue
itala	spazio di frenatura assoluta
pola	bezwzględna długość drogi hamowania
rumana	distanță de frânare absolută
hungara	abszolút fékút
Esperanto	bremsaddistanco haltiga

La en preskaŭ ĉiuj lingvoj menciita absoluteco rilatas al kontinue aŭtomata trajnĝvidado sen konsidero de rapido de la antaŭveturanta trajno en la kalkulo.

Pro tio jenaj terminproponoj (ankaŭ laŭ la proponoj por 02835-1 sur paĝo 3):

- 1) bremsaddistanco absoluta
- 2) bremsadvoja distanco absoluta / bremsadlonga distanco absoluta

franca	déclaration d'intérêt à la livraison
itala	dichiarazione di interesse alla riconsegna
pola	deklaracja wartości dostawy
rumana	declarație asupra dobânzii la livrare
serba	navođenje interesa uredne isporuke
hungara	fivarozási érdekebevallás
Esperanto	interesindiko pri senprokrasta livero

Jen terminproponoj:

1) deklaro pri damaĝkompenso

2) interesdeklaro pri damaĝkompenso

02562 Fervojinstalaĵo por parki kaj bonteni veturilojn, inkluzive de administraj ejoj normale por disponi servon de personalo kaj veturiloj.

ĉeĥa	depo	franca	dépôt
dana	depotværksted	hungara	járműszín
germana	Betriebswerk	Esperanto	(malĝuste) lokomotivejo

Jen terminpropono:

veturilhejmo

02835 Sub tiu ŝlosilnumero troviĝas en la germana lingvo du difinoj kies diferenco estas nur nuanco. La difino 02835-0 respondas al fizika nocio. La difino 02835-1 temas pri distanco inter du punktoj (ekzemple inter antaŭsignalilo kaj ĉefsignalilo, aŭ inter du samdirekte veturantaj trajnoj) surbaze de la fizika grandeco 02835-0.

02835-0 Vojo surveturata ekde la momento de ekbremado ĝis la veturilo haltas aŭ atingas la finrapidon de la bremsado.

ĉeĥa	brzdná dráha	itala	percorso per frenatura
dana	bremsevej	pola	droga hamowania
germana	Bremsweg	rumana	drum de frânare
franca	parcours de freinage	hungara	fékút

Jen terminproponoj:

1) bremsadvojo

2) bremsadlongo

02835-1 Distanco inter la punkto kie necesas ekbremado, kaj la punkto kie la trajno devas halti.

germana	Bremswegabstand	rumana	lungime de opire
franca	distance d'arrêt	serba	zaustavni put (kočenje)
itala	spazio di anesto	Esperanto	bremsaddistanco

Jen terminproponoj:

1) bremsaddistanco

2) bremsadvoja distanco / bremsadlonga distanco

Jen peto por franca kolego: Sub 02835-6 (distance de freinage de service) troviĝas la sekva difino. Bonvolu traduki ĝin al Esperanto.


Distance parcourue par un train avant de s'arrêter à la suite de l'application normale des freins.

08346 Posedanto de fervojinstalaĵo debranĉanta de trako kiun posedas alia fervojklienta entrepreno.

ĉeĥa	vlečkař se spoluživatелеm	itala	sub-raccordato
germana	Nebenanschließer	Esperanto	(malĝuste) kunuzanto de branĉtrako
franca	sous-embranché		

Jen terminpropono:

posedanto de suborda fervojinstalaĵo



La nocio 08346 koncernas entreprenon de fabriko B.

08376 Restado de varvagono super limtempo sekve de prokrastata kargado aŭ malkargado.

ĉeĥa	odstavení	hungara	veszteglés
franca	stationnement	Esperanto	(malĝuste) haltodaŭro de trajno
rumana	staționare		

Jen terminproponoj:

1) kargadmalfriiĝo

2) vagonrestado pro kargadmalfriiĝo

08565 Dekliva flanka limareo de taluso, de tranĉeo en ebena kaj de tranĉeo en deklivo.

ĉeĥa	svah náspu	pola	skarpa kolejowej
dana	baneskråning		budowli ziemnej
germana	Böschung	rumana	talus
franca	talus	serba	kosina
itala	scarpata	hungara	részü
		Esperanto	taluso relvoja

Bedaŭrinde la termino „taluso” laŭ PIV estas homonimo por du diversaj nocioj en la sama subfako BT20 (grundlaboroj), unue por deklivo laŭ supra difino, due por artefarita altaĵo sur kiu pasas vojo (07496).

Pro tio jena terminpropono:

talusdeklivo